# *Kubo: ne plu partoprenos en Pliaj kuracistoj por Brazilo.*



Havano, 14 nov (RHK) La kuba ministerio de publika sano diskonigis oficialan deklaron kie klarigas sian decidon ne plu partopreni en la Programo Pliaj Kuracistoj en Brazilo, kiel estis informite al la direktorino de la tutamerika organizo pri sano kaj al la politikaj gvidantoj brazilaj kiuj fondis kaj defendis tiun ?i iniciaton.

La laboro de la kubaj kuracistoj, ekde la jaro 2013, en lokoj ege malri?aj, en la kvartaloj konataj kiel faveloj de Rio de Janejro, Sao Pa?lo, Salvadoro de Bahía, en la 34 indi?enaj distriktoj specialaj, ?efe en la Amazonio, estis amplekse agnoskita de la registaroj federacia, ?tata kaj distrikta de tiu lando kaj de ties lo?antaro, kiu donis 95% de akceptemo, la? studo farita de la ministerio pri sano de Brazilo per la Universitato Federacia de Minas Gerais.

En 5 jaroj ?irka? 20 mil kubaj kunlaborantoj atentis 113 milionojn 359 mil pacientoj en pli ol 3 mil 600 distriktoj, kovrante ?is 60 milionoj da brazilanoj en la momento kiam la kubanoj estis 80% el ?iuj kuracistoj kiuj partoprenis en la programo. Pli ol 700 brazilaj distriktoj havis kuraciston por la unua fojo en la historio.

La novelektita prezidento Jair Bolsonaro esprimis sin rekte, malestime kaj minace pri la partopreno de kubaj kuracistoj kaj deklaris kaj konfirmis sian decidon modifi la kondi?ojn de la programo malrespekte al la Tutamerika Organizo pri Sano kiu kunordigas ?in, samkiel al la interkonsento

starigita kun Kubo.

Kubo esprimas ke ne estas akceptebla la pridubigo rilate la dececon, profesiecon kaj altruismon de la kubaj kunlaborantoj kiuj kun la subteno de siaj familianoj nuntempe kunlaboras en tiu sudamerika lando kaj entute en 67 landoj.

La deklaro de la ministerio pri publika sano, en 55 jaroj Kubo plenumis 600 mil internaciismaj misioj en 164 landoj kun partopreno de pli ol 400 mil laboristoj de la sansektoro.

Menciindas la heroaj bataloj kontra? ebolo en Afriko, kontra? blindeco en Latinameriko kaj Karibio, ?olero en Haitio kaj partopreno de 26 laborbrigadoj de la internacia ta?mento “Henry Reeve” de fakaj kuracistoj en situacio de katastrofoj kaj grandaj epidemioj en Pakistano, Indonezio, Meksiko, Ekvadoro, Peruo, ?ilio kaj Venezuelo, interalie.

En la plej multo el tiuj misioj, Kubo okupi?is pri la elspezoj, samkiel faciligis la studadon kaj diplomi?on senpagan de 35 mil 613 sanprofesiuloj el 138 landoj kiel esprimo de solidaremo kaj internaciisma spirito.

La kubaj kunlaborantoj eksterlande konservis la tutan tempon sian postenon kaj centprocenton el la salajro en Kubo, kun ?iuj laboraj kaj sociaj garantioj samkiel  la cetero de la laboristoj de la nacia sansistemo.

En sia deklaro, Kubo substrekas ke la popoloj de Nia Ameriko kaj el la tuta mondo scias ke ?iam povas kalkuli je la humanisma kaj solidara emo de la insulaj  profesiuloj.

Kubo esperas ke la brazila popolo, kiu alpropigis al si la programon Pliaj Kuracistoj kiel socia konkero, kaj fidis de la unua momento je la kubaj kuracistoj, aprezas ties virtojn kaj dankas la respekton, sensokapablon kaj profesiecon transdonitan, tiam povos kompreni sur kies ?ultrojn falas la respondeco pri tio ke la kubaj kuracistoj ne povas plu plenumi sian solidareman kontribuon en tiu lando.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/176504-kubo-ne-plu-partoprenos-en-pliaj-kuracistoj-por-brazilo

**Radio Habana Cuba**